

SVENSKA ESPERANTO-TIDNINGEN LA ESPERO

Novembro 1948

36-a jaro N-ro 11

ORGAN FOR SVENSKA ESPERANTO-FORBUNDET

"ELDONA" JUBILEIS



La mendoj de unu tago estas nuntempe bona signo pri la plivigliĝo de nia movado.

ELDONA SOCIETO ESPERANTO

festis sian 30-an datrevenon per solena kunveno en la ejo de Grupo Esperantista de Stockholm la 27-an de oktobro. La estro de la "Eldona" havis la ĝojon bonven-saluti plenan salonon da gastoj. S-ro Morariu parolis pri la historio de la societo donante multajn interesajn informojn pri ĝia evoluo de 1918 ĝis hodiaŭ. Nia tutmonde konata esperanto-aŭtoro s-ro Stellan Engholm parolis pri la eldonado de esperantaj libroj kompare al la agado de naciaj eldonejoj en Svedujo. Li ankaŭ donis valorajn konsilojn esprimante la deziron, ke ĉiuj esperanto-eldonejoj povu fari tutmondan interkonsenton pri la estonta eldonado. (Pri lia parolado; legu lian artikolon en la decembra numero de nia gazeto).

S-ro Ahlm rakontis pri la hodiaŭa stato kaj kion la estraro planas por la morgaŭo. Nia stokholma kunlaboranto sukcesis kapti lin ĉe la kaftablo por ricevi ankoraŭ kelkajn vidpunktojn pri la agado de la Eldona Societo. Ni povas tiel aliloke redoni la intervjuon.

Antaŭ la finiĝo de la sukcesa vespero ni krome havis la ĝojon aŭskulti s-ron Dupuis, kiu kantis kaj ludis pianon, kaj ĉe la fino rakontis s-ro Nylén — nia plej pionira pioniro — pri epizodoj el la unuaj jaroj de la Societo.

Interesa ekspozicio de ĉiuj libroj eldonitaj dum la 30 jaroj altiris la atenton de ĉiuj ĉeestantoj.

Do, se ni antaŭe ne publike esprimis niajn bondezirojn por la plua agado de Eldona Societo Esperanto, ni petas ilin akcepti tiujn nun kvankam iom post festo.

La plej enhaviĉa esperanto-eldonejo en la tuta mondo.

Dum la jubilea festo de Eldona Societo Esperanto en Stockholm ni kaptis la okazon intervjui ĝian estron, s-ron Ahlm, pri la nuna stato kaj estonta agado:

— Ĉu vi povas konstati ian plivigliĝon en la movado kompare al pasinta jaro?

— Certe. Kaj ni ja devus kompreneble nur ĝoji kiam la mendoj venas pli kaj pli amase. Sed kiel vi scias, ĉiun laboron ni devas prizorgi vespere, kio postulas tre grandan forton de solulo. 2—3 semajnoj antaŭ la kongreso kaj ĉiuj post la hejmenveno ne sufiĉis por aranĝi ĉion plej aktualan.

— Ĉu la esperantistoj plendas, se ili devas atendi menditajn librojn?

— Nu, la plej multaj ja scias kiel status la afero kaj al la plendintoj ni kutimas klarigi la kaŭzon de prokrasto — se ni trovas tempon.

— La kongreso en Malmö certe estis bona merkato por viaj libroj?

— Fakte. Ni sendis tien librojn je valoro de ĉ. 7.000 kr. Post la forsendo ni tamen ektimis pensante pri la malfacileco por eksterlandanoj kunpreni monon sufiĉan por libroaĉeto. Sed nia timo montrigis senkaŭza, ĉar je la fino de la kongressemajno ni forvendis pli ol la duonon. Kaj pri tia rezulto ni fieras. (Pli malbone estis en Bern pasintjare, ĉar la oficiala librovendisto tie ankoraŭ ne emis pagi al ni la venditajn librojn!)

— Vi nun faris gravan paŝon tamen, dungante s-ron Dupuis por la ekspedejo?



La estro mem, s-ro Ahlm, trarigardas la alvenintajn poŝtaĵojn, esperante, ke li baldaŭ povu respondi.

SVENSKA ESPERANTO-TIDNINGEN LA ESPERO

Novembro

1948

Revo

Mi havas belan revon. Mi ne scias, ĉu estas konsilinde havi revojn. Eble oni forigu la revadon, ĉar povas esti, ke ĝi malbone influas al onies laborkapablo. Sed ankaŭ povas esti, ke la reva estas bona afero. Kelkaj asertas, ke tion, pri kio oni sufiĉe longe revis, oni post la paso de la bezonata tempo havos. Mi elektis la lastan pli optimisman flankon. Do post jaroj plenumiĝos mia reva.

Pri kio mi revas? Ho jes, mi revas pri tio, ke la esperantistoj ĉiuj frutempe pagus sian abonkotizon por la gazeto! Kaj per "frutempe" mi celas, ke oni en oktobro-novembro-decembro pagu por la venonta jaro. Tiam estus por ni multe pli facile arangi diversajn aferojn. Ni en la komenco de la nova jaro sciis, kiom da abonantoj ni havas, ni ne bezonus sendi ekstrejn ekzemplerojn al tiuj, kiuj ne intencas reaboni, ni havus pli da tempo por ordigi la adresaron ktp.

Mi komprenas vin. Certe vi ne povas tiel per unu fojo ŝanĝi vian kutimon. Tion ni nek postulas. Sed reva ni deziras, esperante, ke tamen iam en la estonto la reva plenumiĝos, kaj por ni la laboro estos plifaciligata.

Oso.

— Espereble tio estas LA SOLVO, kiun ni prirevis dum jaroj pasintaj. Tamen, nun dependos de tio, ĉu la vendado povos fariĝi tiom ampleksa, ke la enspezoj pagos la pli grandajn elspezojn. Ni faris dum ĉi tiu aŭtuno neordinare grandan reklamon en la tagaj gazetoj de Stockholm kaj krome en kelkaj fakgazetoj. Ĉu tio alportos pli da mendoj estas ankoraŭ tro frue prijuĝi; esperon kaj optimismon ni tamen ne perdis.

— Katalogo B estas nun preta. Ĉu ĝia enhavo signifas ke vi nun povas vendi ĉiujn esperantolibrojn eldonitajn en diversaj landoj?

— Ĉiujn eldonadojn ni ne havas, sed la plej multajn. Niaj du katalogoj A kaj B, kiuj enhavas ĉion svedeldonitan resp. la plejmulton el eksterlando, ampleksas kune pli ol 500 diversajn volumojn. Tial ni sendube nun posedas la plej riĉan provizon de esperantaj libroj kaj povas ne sen fiero nomi nin "plej granda en la mondo", kvankam tiu esprimo kutimas signifi ion Usonan.

— Do, la aŭspicioj ŝajne estas favoraj.

— Jes, sed ne dependas nur de niaj ebloj. La esperantistoj, ĉiu en sia loko, havas la plej grandan res-



En la ĉambro kun eksterlandaj libroj plenplenaj bretoj bonvenigas aĉtintojn.

Esperanto venkos la anglan!

Ege interesajn nombrojn oni trovas en raporto el Nlando, legebla en Esperanto. Laŭ la Nederlanda ĵurnalo Het Rotterdamsch Parol la Nederlanda Instituto por la Publika Opinio antaŭ nelonge demandis la Nederlandan publikon:

"Se lingvo devus esti mondlingvo, do en ĉiuj landoj kiel dua lingvo devus esti lernata krom la propra lingvo, kiu lingvo laŭ via opinio devus esti tiu lingvo?"

Jen la respondoj: Angla 38 %, Esperanto 29 %, Franca 2 %, Germana 2 %, Rusa 1 %, aliaj lingvoj 1 %, 27 % ne havis opinionon.

Ĉe la rezultato estas frapante, ke la malpli bonstataj homoj kaj tiuj, kiuj ne povis havi multan instruadon, pli ŝatas esperanton kiel mondlingvon ol la anglan. Tion montras jena tabelo:

	Angla	Esperanto
Homoj kun plej malalta salajro	20 %	29 %
" " malalta "	41 %	33 %
" " mezgrada "	55 %	22 %
" " alta "	47 %	27 %
Homoj kun nur elementa instruado	24 %	31 %
" " unuagrada "	51 %	31 %
" " mezgrada "	59 %	23 %
" " altlerneja "	55 %	17 %

Pri ĉi tiu rezultato ni povas ricevi iom da kontento. Esperanto ja atingis la duan lokon. La diferenco estas negranda, kaj se ĉiu faros sian devon, ni baldaŭ hisos la verdan standardon por signi la venkon.

J. D. Brakel (en Esperanto).

Al la supra informo oni emas aldoni la komenton, ke la ciferoj indikas, ke ni postulu, ke esperanto estu akceptata kiel dua lingvo apud la naciaj lingvoj. Aŭ almenaŭ oni provu havi similan interkonsenton, kian oni havas kun la mondfederalista movado: en ĉiu kunveno oni rajtas paroli esperanton, se la esperantistoj mem povas havigi interpretiston, kiu interpretas al iu el la lingvoj, kiuj estas agnoskitaj kiel kongresaj lingvoj. En tiu maniero esperanto aŭtomate venkos pro sia pli bona taŭgeco kiel internacia lingvo.

pondecon, ĉar sen propagando — kursoj — novaj adeptoj — veraj esperantistoj — libroamantoj, nia laboro restos senfrukta. Nia kunlaboro kun Sveda Esperanto-Federacio kaj aliaj esperantaj organizaĵoj en- kaj eksterlande estas la plej bona kaj ni celas al ankoraŭ pli intima kunlaboro kun aliaj eldonejoj por ke la estonto montru sin pli kaj pli enspeziga.

— Kio nova pri viaj planitaj eldonadoj?

— Krom lernolibroj, kiuj nun tre bone vendiĝas kaj tial staras en la unua vico, jam tradukoj de 3—4 konataj svedaj romanoj estas planataj kaj originala verkaĵo pri svedaj pioniroj de dro E. Olsson troviĝas en manuskripto. Nova sveda kantaro, rakonto pri Svedujo, gvidlibro pri Stockholm kaj ankoraŭ pli bona Sveda Esperanto-Gazeto estas en preparo. Pri ti last-nomita eldonado ni devas konfesi, ke ĝi daŭre donas nur malprofiton. Tial la abonkotizo devas esti iom altigita por la venonta jaro, 5:— kr. por Svedujo kaj 6:— kr. por la cetera mondo. Sed tiel bonaspekta kaj riĉenhava, kiel ĝi nun estas, ni esperas ke la prezo tamen ŝajnas ridinde malalta.

Dankante pro interesaj informoj ni apenaŭ turnis nin for antaŭ ol s-ro Ahlm estis kaptata de fraŭlino scivola pri iu libro. Ĉion li scias kaj ĉiujn li provas kontentigi. La akcio-posedantoj povas resti trankvilaj kiam ilia Eldona Societo Esperanto havas tiel energian gvidanton.

Tiberia Morariu.

El la alvenintaj gratulletoj okaze de la jubileo ni redonas tiun de la danaj kolegoj:

"Bedaŭrinde ni nur nun ekscias pri la dato jam forpasanta, sed tamen ni sentas emon al la multaj gratuletoj, kiujn vi tre verŝajne jam ricevis, ankaŭ aldoni niajn bondezirojn por la estonteco kaj samtempe danki pro bona kunlaboro en tempo jam pasinta. Libroservo de CDEL G. Kühlman".

Esperanto instruata en aŭstria universitato

La fama aŭstria universitato en Innsbruck, Tirol, starigis lektoraton de la lingvo esperanto. La aŭstria federacia ministro pri instruaj aferoj per dekreto de la 17-VII-1948 eknomis d-ro'n Leo Blaas lektoro de esperanto. (La Praktiko).

Esperantistino sur Usona poŝtmarko

Memora poŝtmarko kun la bildo de nia samideanino Clara Barton, fondintino de la Amerika Ruĝa Kruco, aperis en septembro. Clara Barton, kiu organizis la zorgon pri la vunditoj en la usona civila milito kaj en la franca-prusa milito, lernis esperanton, kiam ŝi estis jam 90-jara, konvinkiginta pri la neceso kaj graveco de internacia helplingvo. Ŝi naskiĝis la 25. 12. 1881 kaj mortis la 12. 4. 1912. (Heroldo).

"New York - la internacia urbo"

estis la titolo de grandega murbildo en la Ora Jubilea Ekspozicio okazinta en "Grand Central Palace", Nov-Jorko, dum aŭgusto kaj septembro. Ĝi montris, ke aperas en la urbo pli ol 200 fremdlingvaj gazetoj en 31 malsamaj lingvoj, inter ili 28 ĉiutagaj ĵurnaloj. Ke esperanto estas unu el tiuj lingvoj vidigis de surgluita ekzemplero de "Amerika Esperantisto" en bone videbla loko. (Heroldo).

Packongreso de la Ruĝa Kruco

Dum la tago 15—16 de oktobro nunjara okazos en Hago la unua kongreso de la "Nederlanda Movado por Akceli Internacian Pacon kaj Sekurecon", iniciata de la Nederlanda Ruĝ-Kruca Unuiĝo. Je la invito de ĉi tiu unuiĝo ankaŭ la Universala Ligo partoprenas en la nomita movado, kaj la viceprezidantino de UL, ŝino Julia Isbrucker, estis elektata en la studkomisionon por labori la agadprogramon. La ligo estraro insiste petas la liganon en Hago kaj ĉirkaŭaĵoj, partopreni en la kongreso, por ke nia Ligo estu en ĝi inde kaj efike reprezentata. (La Praktiko).

Esperantista teatro

En Germanujo, en la lando de la poetoj, filozofoj kaj teatra arto, estas fondita la unua teatro de la esperanta movado. Kiel teatro migranta oni intencas vojaĝi al multaj landoj por aktori bonajn teatraĵojn. Oni petas interesulojn kaj amikojn envicigi en la teatra rondo. Tiel oni povas helpi pri la progreso de la esperanta movado. Informojn oni povas kontraŭ unu rpk ricevi de profesoro A. Steynhardt, L ü n e n, Westfalen, Viktoriastr. 39 d, Germanujo, Erita Zono.

Kursoj en Bournemouth.

Pro la venontjara kongreso en Bournemouth oni jam starigis kursojn. Sin anoncis 190 personoj, kaj oni atendas ankoraŭ du kursojn. El la partoprenantoj 40 estas poŝtistoj, kiujn s-ro Nicolaisen instruas en du kursoj.

Adreso de la kongresa oficejo: 2, Wootton Gardens, B o u r n e m o u t h, Anglujo.

F-ino Julie Supichova

denove produktis libron, ĉi tiun fojon lernolibron por junuloj. Ni sentas nin iomete demandemaj pri la instrua procedo, ĉar la libro komenciĝas per la esperanta alfabeto. La cent unuaj pecoj ne havas tekston en esperanto, kaj la unua tekstpeco havas tiajn formojn, kiaj "dezirus korespondi", "naskiĝis", "priskribos", "vizitinda".

Ŝaka korespondturniro kun partoprenantoj el 19 landoj

La esperantofako de ICCA (The International Correspondence Chess Association — Internacia korespondŝaka asocio) organizas jam de aŭgusto 1946 korespondturnirojn por ŝakistoj-esperantistoj. Jam ludas pli ol 100 ŝakistoj el 19 landoj en 15 grupoj. Novaj grupoj ekludos tuj, kiam aliĝis bezona nombro da partoprenantoj. Aliĝoj estas ĉiam akceptataj.

La esperanta fako de ICCA preparas nun sian Olimpiadon. Estos turniro de landaj teamoj — po 6 ŝakistoj. Ĝi komenciĝos la 1-an de januaro 1949. Interesuloj skribu tuj al la turnirgvidanto.

La oficiala organo de ICCA enhavas en ĉiu numero esperantan rubrikon kun artikoloj kaj informoj pri esperantista ŝaka vivo. La esperantofako de ICCA preparas nun oficialan fakan terminaron. Por informoj skribu al la turnirgvidanto d-ro V. Faigl, Zlonice, Ĉeĥoslovakujo. (Rpk! — Red.) (Svisa Espero)

Dum la studsezono 1947—1948 oni instruis kaj prelegis pri esperanto en 91 unu lernejoj de Anglujo. La sukceso estis tute kontentiga.

Brazilo oficialigas esperanton

La Stata Departemento pri Statistikoj publikigis dekreton, laŭ kiu estas aranĝitaj esperantaj kursoj por la oficistoj de la departemento. La postuloj estas, ke la kurso konduku al praktika scipovo de nia helplingvo por korespondado kaj por la verkado de resumoj de la statistikaj publikigaĵoj. La kurso funkcias trifoje semajne, ĉiutage dum 50 minutoj, en dejora tempo. La instruiston oni pagas.

Kom med i det internationella samarbetet!

Nu är åter tid att inbetala årsavgift till UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO — esperantisternas stora samlingsorganisation med medlemmar i ett 60-tal land.

Ar Ni inte redan medlem, inbjuder vi Er till medlemskap. Årsavgifterna är: För MJ-medlem med årsbok — kr. 4:—, MA-medlem med tidning och årsbok — kr. 10:—, MS-understödjande medlem (tidning och årsbok) — kr. 20:—, PATRONO kallas den, som betalar kr. 100:—, vilket innebär medlemskap och ett stöd för UEA:s verksamhet.

DUMVIVA MEMBRO — alltså livstidsmedlem — blir den, som en gång för alla betalar kr. 200:—. Denna medlem får under hela sin livstid årsboken varje år och tidningen månatligen. Såväl Dumviva medlem som Patrono och MS har alltid sina namn i årsboken som en honorär för den tjänst, de ekonomiskt gör rörelsen.

På platser, där vi inte har delegater — esperantokonsuler — önskar vi sådana. Dessa måste vara minst MA, då Bernkongressen beslutat, att inte antaga MJ-medlemmar som "delegitöj". Vidare kan endast den, som varit medlem minst ett år, rekommenderas till delegito. Delegater mottages även för turismo, filatelio och diverse yrken och intressen. Genom medlemskap i UEA räknas Ni som aktiv medlem i det internationella samarbetet och har dessutom god hjälp vid resor etc.

Årsavgiften för UEA sändes per postgiro 44381, redaktör Einar Adamson, Värmlandsgatan 18, Göteborg. Vid förfrågningar bilägg postporto.

IOGT och Esperanto

IOGT och Svenska Esperanto-Förbundets avdelningar i Göteborg anordnar gemensamt informations- och studiemöte söndagen den 5 december kl. 15 i IOGT:s lokaler, Norra Allégatan 3. Föreläsningar hållas av Göteborgs Godtemplardistrikts ordförande, dir. Arthur Manegard, fru Anna Alamo, spärklärare Willy Burge-meister samt fil. stud. Ebbe Vilborg. Vidare förekommer musik och körsång samt utställning av esperantolitteratur. En esperantokurs för godtemplare planeras i början av näret.

La Sveda Lerneja Komisiono atakata

La Pedagogia Klubo, Strängnäs, sub prezidanteco de nia samideano lektoro Bjarne Beckman, faris atakon al la laboranta sveda Lerneja Komisiono. Ni pensas, ke ni povas preterlasi ĉiujn aliajn detalojn en tiu afero kaj publikii nur la dokumenton, kiun oni sendis al la lerneja Komisiono kaj al la Lerneja Cefestraro. Ĝi tekstas en iom libera traduko el la sveda:

Al la Lerneja Komisiono de 1946.

La Pedagogia Klubo de Strängnäs, kiu dum diskuto pri la ekspertizo de la Lerneja Komisiono ankaŭ atentis pri la problemoj de la instruado de lingvoj, per tiu ĉi skribo deziras humile atentigi Vin pri la sekvantaj vidpunktoj.

Tiu instruado pri fremdaj lingvoj, kiun oni planas por la kvina kaj sesa klasoj de la uniforma lernejo, renkontos konsiderindajn malfacilaĵojn, pri kiuj la Komisiono ja ankaŭ plene konscias. Ĝi postulas konsiderindan nombron da lecionoj, kaj verŝajne estos sufiĉe malfacile atingi grandajn kaj daŭrajn rezultojn ĉe tiu heterogena gelnantaro, kiu vizitos tiun lernejon, precipe ĉar verŝajne ne estos eble amase eduki istojn por la instruado en tiu stadio.

Ankaŭ en pli altaj stadioj la instruado de la lingvoj donas malfacile solveblajn problemojn. Ĝi daŭre okupos grandan parton de la labortempo kaj per tio kontribuos al la ofte kritikita amasiĝo de studtemoj. Ĝi por la lernantoj estos tre peza, precipe ĉar oni opinias grava la talenton skribe kaj buŝe trakti la fremdan lingvon korekte. Tia korekteco por multaj havos nur negrandan praktikan signifon, sed grave malpliigas tiun tempon, kiun oni bezonas dediĉi al precipe la orientiĝaj temoj.

Sub tiaj cirkonstancoj oni povas demandi, ĉu ne estus pli oportune enkonduki en la lernejon, komence en la pli malalta stadio, la lernigon de neŭtrala, internacia helplingvo. Por tiu celo unuavice oni devas pensi pri esperanto, kiu estas la sola helplingvo, kiu gajnis vastan agnoskon, estas subtenata de ampleksa organizo, kaj vere estas provita en lernejoj de diferencaj tipoj en diversaj landoj. Krome oni jam edukis nombron da instruistoj ĉe ŝtataj kursoj en nia lando. Ĉe faritaj provoj montriĝis, ke lernantoj povas post nur unujara studo je du lecionoj ĉiusemajne atingi sufiĉan buŝan kaj skriban uzopovon de esperanto, kaj ke ankaŭ malpli talentaj lernantoj atingas kontentigan rezulton. Ankaŭ ne estas malfacile amase eduki instruistojn por tiu lingvo, ĉar la lingvo por kreskintaj personoj kun bona studa

bazo estas tre facile lernebla. Ankaŭ montriĝis, ke la studado de tre logike farita lingvo, kia esperanto, faciligas la instruon pri elementa gramatiko, kiun oni preferu faru samtempe kun la instruado de la helplingvo. Tiel oni plibonigas la rezulton en aliaj lingvoj, kiaj la gepatra, la germana, angla, franca, latina. Se esperanto atingus ĝeneralan agnoskon ankaŭ en aliaj landoj, oni povas kalkuli kun tio, ke ĝi estos la dominanta lingva komunikilo buŝa kaj skriba, kaj ke, por ekzemplo, ĉiuj kompendioj estos publikigitaj en tiu lingvo. Tiam la instruado en fremdaj lingvoj povos esti tute koncentrigata je la tasko doni al la lernantoj eblon legi kaj kompreni la fremdan lingvon kaj doni al ili pli profundan konon pri la belliteraturo kaj kulturo de la fremda popolo, kaj tamen oni povus, almenaŭ en certaj klasoj, malaltigi la nombron de lecionoj. El eduka vidpunkto oni perdis nenion, sed gajnus multon.

Eble oni pensas, ke tia reformo estas tro malproksima, precipe ĉar ĝi ja postulas internaciajn interkoncentojn, kiajn oni en la nuna stato de la mondo eventuale ne povos atingi. Tamen, ĉar la lerneja reformo mem kredeble ne estos preta pli frue ol en la 60-aj jaroj aŭ eĉ pli poste, oni ne povas vidi malhelpon, jam nun pritrakti tiun problemon, precipe ĉar ja komence povas esti nur provo.

Montrante al la supra rezonado do ni, la Pedagogia Klubo de Strängnäs, humile proponas, ke oni esploru la eblecon enkonduki provan instruadon pri helplingvo, ekzemple esperanto, anstataŭ la angla en la 5-a kaj 6-a klasoj de la unuforma lernejo. La provo estu farata en ne tro malgranda nombro de lernejoj, kie oni povas trovi taŭgajn kaj emajn instruistojn.

Strängnäs la 7-an de oktobro 1948.

Humile

B. J. Beckman

Lektoro, Prez. de la Pedagogia Klubo de Strängnäs.

Sveda Esperanto-Instituto rekomendas, ke aliaj asocioj imitu la ekzemplon de la pedagogia grupo en Strängnäs. Temas pri instruistgrupoj, lerneja estroj, grupoj de ABF kaj de aliaj studorganizaĵoj. Estas preferinde ke esperanto-asocioj ne faru petskribojn. — Bonvolu noti, ke eventualaj skribaĵoj devos alveni al "Kungl. Skolöverstyrelsen" antaŭ 1 dec. Ĉiu eluzu sian influon! Kaj sendu kopion de la petskribo al Sveda Esperanto-Instituto.

SAV

Ni esperantistoj ja preskaŭ povas trovi tiujn tri literojn simbolaj. Ili estas la komencaj literoj de la sveda nomo por Sveda Laborgrupo por Mondfederalismo. (Svenska Arbetsgruppen för Världsfederation). La unua informilo de la laborgrupo, Världsfederationsnytt, aperis kun mallongaj informoj pri la fondaj laboroj. La celo de la nova organizo ja estas tute la sama kiel tiu de la Federelisma sekcio de Sveda Esperanto-Federacio. Tiu, kiu legis la libron de Emery Reves: *Anatomy of Peace*, svede Fredens Anatomi, ne povas ne esti kaptita de la ideo pri mondfederalismo. Por ni esperantistoj la mondfederalismo estas tute natura afero. Ni en niaj koroj jam delonge estas mondcivitanoj. Ke Svedujo nun ekhavis organizan organon por la mondfederalisma movado, oni devas kun gojo saluti. Intersigintoj povas sin turni al Svenska Arbetsgruppen för Världsfederation, Kungstensgatan 1 V, Stockholm.

Universala Ligo

Serion de prelegoj s-ro P. L. Wright aranĝas en The Bourne Methodist Hall, London N 14, pri diversaj temoj pri la mondpaĉa problemoj. Gratulojn pri la aranĝo povas sendi al s-ro Wright interesigintoj.

GAZETO — KOLEGOJ!

Bonvolu ekde 1948 sendi la interŝanĝekzemplerojn de vi gazeto jene:

1 ekz. al Red. O. Svantesson, Skonertgatan 1,
Göteborg V, Svedujo.

1 ekz. al Eldona Societo Esperanto, Fack 19071,
Stockholm 19, Svedujo.

Atentu: Ni sendas interŝanĝe 2 ekz. de nia gazeto nur al tiuj regule aperantaj gazetoj, kiuj sendas saman nombron al ni.

Redakcio & Eldonejo de Sveda Esperanto-Gazeto
La Espero.

Bonega konferenco en Skövde

La 26-an de septembro okazis studkonferenco en Skövde. S-ro Åberg jam en la sabata vespero antaŭa salutis nin bonvenaj. Rezentantoj de ABF ĉeestis, kiam la esperantistoj kolektiĝis en la bela studhejmo de Skövde. Jam la unuan vesperon s-ro Stenström prelegis pri Esperanto kiel literatura lingvo. En la dua tago ni aŭdis prelegon de s-ro Eric Carlén, kiel kristano utiligas esperanton. Ankaŭ parolis s-ro Oskar Svantesson pri esperanta gazetaro entute, sed pri la Sveda Esperanto-Gazeto speciale. En la sama tago ankaŭ bonŝance alvenis al la urbo la sekretario de la Laborgrupo por Federalisma movado en Svedujo, civila ekonomo Carl-Erik Almström, kiu povis rakonti pri la pritraktoj en la ĵus okazinta kunveno de federalistoj en Luksemburgo.

La dua tago komenciĝis per vizito al la tombo de Karl Falk, kie s-ro Åberg parolis, rememorigante pri la laboro de la forpasinta amiko kaj akcentante la faron de la forpasinto kaj kiel li ankaŭ post la morto estas kuntenanta ĉenero por la esperantistoj.

S-ro Stenström en sia prelego akcentis, ke liaj diroj sin bazas sur notoj de fraŭlino Ella Nilsson el Sölvesborg, kaj ke do la prelego estas de ŝi, ne de s-ro Stenström, kiu estas nur la leganto. La prelego tuŝis la esperantan poezion nuntagan kaj frutempan. Kaloscaj, Petöfi, Grabowski kaj aliaj preterpasis antaŭ ni en akompano de egipta poeto 3500-jara kaj ĉina 1100-jara. Esperanto sin montris bonega esprimilo por ĉiuj.

El svedaj poetoj estas tradukitaj Ekelund, Karlfeldt, Fröding, Bergman k. a. Bonan traduklaboron faris Magda Carlsson.

S-ro Carlén akcentis, ke kristano povas uzi esperanton diversmaniere. Li povas per ĝi misii, sed li ankaŭ per ĝi povas mem pli funde enpenetri la veron. Per studado de la esperanta biblio li ekhavas fidindan tradukon de la originala vorto, ekhavas lingvan ekzercon.

Per korespondado la kristano povas porti la mesaĝon al aliaj homoj. Speciale sukcesa per tio estis pastro Furhammar.

En konferencoj kaj kunvenoj oni povas ekhavi la rektan kontakton inter kredantoj, kiel okazis ekzemple en Tostarp pasintsumere. Diservoj en la esperantaj kongresoj ankaŭ estas speco de porkristana laboro, per kiu oni povas rekte paroli al la homoj. Per esperanto oni ankaŭ eldonas literaturon.

La enhavon de la prelego de la redaktoro de la gazeto oni povas iom post iom legi en la gazeto, kial ni povas preterpasi ĝin.

Anstataŭe ni nin turnas tuj al la prelego de s-ro Almström. Li vizitis la Luksemburgan konferencon de federalistoj, kaj li rakontis pri ĝi. Unu el la delegitoj en la konferenco parolis esperanton, kaj oni demandis, ĉu estas permesate, paroli alian lingvon ol la anglan aŭ la francan. La informo tekstis, ke oni rajtas paroli iun ajn lingvon, sed ke la tradukoj okazu nur en la anglan aŭ en la francan. Partoprenis 400—500 delegitoj. Oni



Åberg parolas ĉe la tombo de Karl Falk.

rimarkas, ke nun estas plena laboro por veta armiligo de la mondo. En la direkto, al kiu montris Reeves per sia libro, nenio estas farita. Tamen estas evidente, ke la federalisma laboro kaj efektiveco devas esti subtenata de potenco. Do, la unua paŝo devas esti, konvinki milionojn da homoj pri la neceseco de la federalismo. Oni ne povas fortimigi la homojn de la milito, sed oni devas montri la avantaĝon de unueca mondo.

Oni ne povas atendi, ke Rusujo aliĝos al la federalisma penso. Sed ekz. Wolburn proponas, ke oni formu federativon de tiuj ŝtatoj, kiuj estas emaj, kaj iom post iom aliĝu aliaj.

La plano de Euston proponas, ke oni ĝis 1950 kreu fortan federalisman movadon, kaj ke oni en tiu jaro aranĝu tutmondŝtatan parlamenton en Svisujo. Tio ne estas nur planoj. La laboro estas en plena disvolvigo, kaj la parlamento okazos, se ne estos tute nevenkeblaj baroj. Oni elektos unu delegiton por ĉiu miliono da loĝantoj, eventuale kun maksimumo de la nombro por la pli grandaj ŝtatoj.

El la svedaj parlamentanoj 55 havas pozitivan intereson por la federalisma movado, kaj antaŭ nelonge estas fondita la sveda laborgrupo por federalismo.

Diskutado.

Post ĉiuj prelegoj okazis komuna diskutado. S-ro Åberg deziras kunlaboron kun diversaj popolmovadoj, abstinenco, kristana, sindikata, instruista ktp. Ni senkoste servu al ili por povi poste postuli ilian helpon kaj subtenon. Anoncado en la gazetaro kaj persona propagando estas valoraj rimedoj.

S-ro Sjöholm diras, ke estas danĝere promesi lernon de esperanto per studado dum 20 lecionoj. Povas okazi, ke la kursanoj sin sentas trompita kaj deturniĝas de la movado.

S-ro Åberg: La esperantistoj laboru en malgrandaj grupoj, sed eksteren ili faru grandan propagandon.

S-ro Thomander: Mankas studgvidantoj. Li atendas la kolonon por komencantoj, pri kiu la redaktoro promesis, ke ĝi aperos en la gazeto, kaj li demandis, kiam. La redaktoro nur povis diri, ke li havas la promeson de s-ro Dahl, ke tiu verkos la artikolon, kaj ke verŝajne li ankaŭ faros.

S-ro Lindén opinias, ke propaganda gazeto ne nepre bezonas esti en la sveda lingvo. Bona kaj bela gazeto en si mem estas la plej efika propagandilo.

La kongresaj aranĝoj estis simplaj kaj bonaj. Ni manĝis ĉiuj en Studiegården. Oni klare povas vidi, kiom tia studhejmo plifaciligas la aranĝon. Kaj nenio povas esti pli alloga ol la kunveno en la sabata vespero antaŭ la fajro en la kameno en la halo de la studhejmo. Oni estingis la elektran lamparon, la flamanta fajro liveris la lumon, kaj ni aŭskultis la rakontojn de diversaj esperantistoj pri iliaj travivaĵoj kaj spertoj, aŭdis s-ron Åberg ludi kaj kanti ktp.

En la kunveno oni decidis skribi al diversaj radiostacioj, kiuj sendas en esperanto. Poste ni eksciis, ke kelkaj el ili afable respondis al nia letero. — En la konferenco okazis kolekto de mono por la nova Esperantofrämmandet. Ĝi donis la rezulton de 65 kr.

Distrikta kunveno en Borås.

La esperantistoj en Vestrogotio, Gotenburgo, Bohuslän, Halland estas vokitaj al Borås por distrikta kunveno en la ejo de KFUM dimanĉe la 21-an de novembro je la 10-a horo. Versajne ĉeestos s-roj Dahl kaj Åberg, ev. ankaŭ Svantesson.

La programo estos tre varia kun kanto, muziko kaj disdonado de diplomoj al multjaraj esperantistoj. En la antaŭtagmezo estos distrikta kunveno. En la posttagmezo la klubo Verda Rondo festos sian 15-jaran ekziston.

Estas planoj pri reorganizo kaj pliampleksigo de la distrikto. Oni verŝajne proponos, ke la distrikto ampleksu la tutan okcidentan Svedujon.

Från förbundssekreteraren

Esperantoförbundet har fått ett välvilligt mottagande av både esperantister och andra sympatisörer. Ännu vet väl inte alla vad Esperantoförbundet är, men allt fler börjar få klart för sig, vad det betyder, att denna stödorganisation finns, och bidragen börjar strömma in allt tätare. När detta skrives, har vi uppnått den första tusenlappen. Men det skall bli många, många fler.

Medlemsavgifterna till SEF förslår inte långt, då det gäller att ge allmänheten upplysningar om esperanto. Det fordras hjälp för att den informationsverksamhet, som vi enligt stadgarna bedriver, skall få någon avgörande betydelse. Det är de små frivilliga bidragen, skänkta till Esperantoförbundet från de många, som skall ge möjligheter att på ett effektivt sätt tala om för det uppväxande släktet, vad esperanto är, vad språket betyder för världsutvecklingen, hur man lär sig det, och hur man utnyttjar sina kunskaper i esperanto.

Varje esperantist inser säkert betydelsen av att esperantoförbunden erhåller ekonomiskt stöd. Bidrag insändes till Esperantoförbundet, Stockholm. Postgirokonto 90 08 08.

Esperantoutställning. SEF:s värdefulla vandrartställning är numera skingrad och det material, som finns kvar, är inaktuellt. Vi skall nu iordningställa en ny utställning, och vi ber om er hjälp. De, som har delar av den gamla utställningen, ombedjas återsända dem. De, som vill donera lämpligt material till den nya, är välkomna. Sänd det till sekr. i Stockholm.

Medlemsavgiften. Året nalkas sitt slut, och vi har den mindre angenäma plikten att påminna om, att medlems- och prenumerationsavgifter för det nya året snart skall betalas. Om betalning insändes före årsskiftet, innebär detta lättnad i sekr. arbetsböda.

Avgiften för direkt ansluten medlem är fortfarande endast kr. 7:50. För klubbansluten medlem betalas till SEF kr. 5:— . Vi vill föreslå klubbstyrelserna att tidigt inkassera denna summa av medlemmarna. Efter resp. årsmöten, som vanligen bestämmer årsavgiftens storlek, kan lämpligen den del av medlemsavgiften, som tillfaller klubben, uttagas av medlemmarna mot särskilt kvitto. Esperantotidningen utgår utan vidare avgift till envar medlem av dessa kategorier. För familjemedlem betalas 2 kr.

Prenumeration på tidningen utan medlemskap kostar 5 kr. för år 1949. (För prenumerant utom Sverige 6 kr.) Inbetalningar sker till Svenska Esperanto-Förbundet, Tegelbacken, Stockholm. Postgiro 2012.

Helmer Almén.

Mat och husrum åt esperantister.

Enligt en motion vid förbundsmötet sistlidna pingst (se aprilnumret) vill SEF söka upprätta ett nät av ombud på olika platser i Sverige, som skall stå resande esperantister till tjänst med mat och rum mot betalning (alltså ej att förväxla med UEA:s turistdelegater).

Systemet bygger i viss mån på ömsesidigt förtroende mellan esperantister, men man måste också ställa vissa villkor för att få utnyttja dessa ombud eller gastigo-delegator: medlemskap i UEA, förhandsanmälan och förhandsbetalning, att gästen medför eget sänglinne. Taxan sättes till 7 kronor för mat och rum per dag, eller 3:50 kronor för endast rum och morgonmål, t. ex. kaffebröd.

En lista över gastigo-delegator publiceras varje år i denna tidning eller på annat sätt.

Meningen är att vi med tiden skall försöka att utsträcka organisationen även till andra länder, främst de nordiska, så snart möjlighet därtill ges. Det kan då bli lämpligt att införa ett speciellt betalningsmedel som blir gångbart i alla anslutna länder, eventuellt grundat på myntenheten 1 stelo (Universala Ligo, 1 stelo = 35 öre).

Den som hyrt ut rum skulle i sin tur kunna använda den erhållna biljetten eller sedeln på andra platser, även utomlands, eller sälja den. Turisttjänstens central

Redakcia babilado

Nomoj en Esperantujo.

Mi legis interesan artikolon en Esperanto pri diversaj nomoj kaj pri ilia transskribo en esperanton. Kial ne krei esperantan nomaron, kian ni havas svedan? Nia kalendara libro, kiun eldonas ĉiujare la Scienca Akademio kun solrajto, havas nomliston kun unu nomo por ĉiu tago. Ĉu la kutimo estas plimalpli internacia? Oni povus fari tian liston de esperantaj nomoj. Nur la viraj nomoj estas publikigencaj. La virinajn ni regule formu per la aldono de la sufikso virina. Certe oni povus kun la helpo de la diverslandaj esperantistoj trovi 366 tiajn nomojn, kiuj forme kaj multfoje ankaŭ signifite estus bonaj esperantaj nomoj. El tiu listo, aŭ ekster ĝi, se ni estus tre originalemaj, ni elektu por ni esperantistindividuaĵajn nomojn, kiujn ni povus uzi flanke de niaj nacilingvaj nomoj. Ni komencu pensi kaj agi superacie! La homaro estas unu. Ni agu laŭe!

Ni legis

interesan cirkuleron de Liaison Committee for World Government, 20 Buckingham Street, Strand, London WC 2, s-ro G. Krauss por Internaciaj Kontaktoj. Evidente la penso pri mondregistaro eksplode disvastiĝos tra la mondo, kaj ni esperantistoj havas veran kaŭzon atente sekvi tiujn farojn. Internacia lingvo estas kaj estu esperanto. Oni povas esti certa, ke la afero pri mondregistaro progresos. Ĝi simple devos progresi. Ĉar la homoj timas la atombombon kaj aliajn detruilojn de la venonta milito, kaj mondregistaro estas la sola kaj efektiva rimedo eviti tiun militon. Tamen, ŝajnas al mi, ke nia Universala Ligo estus la loko por internaciaj kontaktoj kun ĉiuj similaj movadoj. Interesigantoj sin turnu al la suprenomita adreso. Aldonu respondkuponon!

skulle lösa in biljetten till något lägre pris. Detta med ett särskilt betalningsmedel blir dock inte aktuellt förrän organisationen blivit mera internationell.

Vi uppmanar var och en som vill bli gastigo-delegito och därigenom underlätta resorna för esperantister och själv få tillfälle till intressanta bekantskaper, att omedelbart skriva till SEF och uppges:

1. namn,
2. adress, eventuellt telefonnummer,
3. antal disponibla bäddar,
4. för vilken del av år 1949 erbjudandet gäller (helst hela året),
5. särskilda upplysningar eller önskemål.

Svenska Esperantoförbundet,
Tegelbacken, Stockholm.

- MÅNADENS BOKTIPS -

Noni kaj Mani

av Jon Svensson

Rakonto pri la spertoj de du islandaj knaboj, kiuj veturas per remboato kaj perdisas ie sur la vasta maro.

Illustrerad. 160 sidor. Inbunden.

Kr. 3:—

(+ 10 % för porto vid ordrer under 10:— kr.)



FÖRLAGSFÖRENINGEN
ESPERANTO
Fack 190 71 Stockholm 19
Postgiro 578

AERONAŬTIKA TERMINARO

sveda — esperanta

Teknika sekcio de SEF estis fondata aŭtune 1947. Ĝia celo estas i. a. krei teknikajn terminarojn en esperanto, kaj speciale laŭ sveda-esperanta kaj esperanta-sveda aranĝo.

Tiu ĉi listo estas plejparte traduko de la Aeronautika terminaro verkita de E. D. Durrant kaj eldonita de Internacia Esperanto-Ligo en 1941. IEL (nuna UEA) afable donis al ni permeson ĉerpi el la vortaro kaj reprodukti ĝiajn bildojn. Nur malmultajn terminojn ni aldonis el aliaj fontoj. Inĝeniero Fred Turner faris la tradukon.

La listo povas servi kiel bazo por plua diskuto pri eventualaj ŝanĝoj kaj aldonoj, kaj ni danke akceptas kritikon. Ni trovis la metodon aperigi la liston kiel aldonon al La Espero la plej racia, ĉar tiel ĝi aŭtomate estas distribuata je 2000 ekzempleroj sen ekstra laboro. Aparte presitaj listoj estas haveblaj por 30 oeroj aŭ 1 respondkupono.

Aliajn terminarojn ni provos aperigi en simila maniero. Verŝajne la venonta estos Radio-terminaro.

S. Alexandersson

accelerometer: akcelmezurilo
aerodyn: aerodino
aerodynamik: aerodinamiko
aeromekanik: aeromekaniko
aeronaut: aeronauĉo
aeronautik: aeronauĉitiko
aeroplan: aeroplano
aerostat: aerostato
aerostatik: aerostatiko
akterstolpe: fosto malantaŭa
aktionsradie: flugradiuso
amfibieflygplan: amfibio
anfallsvinkel: angulo incida
anfallsvinkelmätare: incidindikilo
anflugning: enflugo
anflugningsradiofyr: radiogvidilo enfluga
arbetslinje: linio referenca
autogiro: rotorplano
avdriftsvinkel = driftvinkel
avvägning: pesado
axel
axlar relativt luften: aksoj relative la venton
axlar relativt flygplanet: aksoj relative la aerodinson
avdrift: drivo
avdriftsmätare: drivindikilo
avgasanalyator: analizilo elfugasa
avisningsanordning: deglaciilo
avlösningsplunkt: punkto disflua
bakkant: eĝo posta
baktung: vostpeza
ballong: balono
ballong fast: balono fiksa
ballong- och luftskeppsfart: aviado aerostata
ballonghals: balonkolo
beklädnad:
1 (lös): kovrilo
2 (fast): tegajo
belysning invändig: lumigado aviadila, lumigado interna
betryka (med flygplansfärg): apreturi
biplan: biplano
blad: alo
bladlutning: klino ala
bladvinkel: angulo ala
blindlandningsfyr: radiogvidilo
bränslemanometer: fluidindikilo
bränslemätare: flumezurilo
bränsleur: brulajindikilo

bunt: bonto
bäring: biro
bärlina: pendkablo
bäryta: surfacaĵo (porta)
centrum aerodynamiskt: centro aerodinamika
cyklogiro: ciklogiro

diskarea = propellerfältsaera
divergens = pendling instabil
dragkraft: tiro
drakballong: kajtblono
drake: kajto
driftvinkel: drivangulo
dyka: plonĝi
dyka med motorpådtag: flugplonĝi
dämpningsfaktor: faktoro amortiza

effektbelastning: ŝarĝo laŭpova
expedieringsplattform = hangarplatta

fackla för avdriftsmätning: faltoro naviga
fall fritt: falo libera
fallskärm: paraŝuto
fallskärm automatisk: paraŝuto aŭtomata
fallskärm fri: paraŝuto libera
fallskärmskalott: tuko paraŝuta
fallskärmsljus: torĉo paraŝuta
fart: rapido aera (vera)
fart indikerad: rapido indikata aera
fena: direktalo, planeo stabiliga
fillet: formgarnaĵo
finhöjdmätare: statoskopo
fladder: svingvibro
fladdring = fladder
flatspinn: falspiralo plata
flottör: flotilo
flottörflygplan: hidroplano flotila
flottörställ: flotekipaĵo
flyg: aviado
flyga: aviadi
flyga i spiral: spirali
flyga i termik: sori
flygbana: trajektorio
flygbanvinkelmätare: registrilo trajektoria
flygbåt: flugboato, hidroplano boata
flygfyr: gvidlumilo
flygfält: flugkampoj

flygfältsbelysning: lumoj aerodromaj, lumoj flughavenaj
 flygförare: piloto
 flyghamn: flughaveno
 flygkonst: aviado
 flygkorridor: flugaleo
 flygkropp: fuzelo
 flyglinje: fluglinio
 flygläge
 1 (relativt luften): pozo fluga
 2 (relativt marken): pozo laŭtera
 flygmaskin: flugmaŝino, aeroplano, aviadilo
 flygmekaniker: flugmekanisto
 (med licens): ingeniero terena
 flygning: flugo
 flygning vanlig: flugo normala
 flygplan: aeroplano
 flygplan flervingat: multoplano
 flygplan hangarfartygsbaserat: ŝipaviadilo
 flygplan med dragande propeller: aeroplano tira
 flygplan med skjutande propeller: aeroplano puŝa
 flygplansfärg: apreturo
 flygplats: aerodromo
 flygplatsfyr: gvidlumo marka
 flygrutt: flugvojo
 flygruttsbelysning: lumoj flugvojoj
 flygruttsfyr: gvidlumo flugvojoj
 flygsträcka längsta = räckvidd
 flygteknik: aeronautiko
 flygvikt maximal: pezo plena
 flyta: floti
 flytkraft: flotforto
 fotspak: stango direkta
 Fowler-klaff: postklapo etenda
 framkant: eĝo fronta
 friballong: balono libera
 fyllnadsgrad (bladareapropellerfältareo): solideco
 fyr fast: lumoj konstanta
 fyr periodiskt varierande: lumoj ritma
 fältgränsljus: lumoj kamplima
 färdhastighet: (flug)rapido laŭtera
 färdlinje: trako
 färdvinkel: trakangulo
 gashölje: gasujo, gaskovrilo, gasosako
 gir: joro
 gira: jori
 girning
 1 (= gir): joro
 2 jorado
 girkompass: vojindikilo
 girmoment: momento jora
 glidflygning i spiral: gliso spirala
 glidflygplan: glisilo
 glidflykt: gliso
 utföra glidflykt: glisi
 glidvinkel: angulo glisa
 gondol: nacelo
 gränsskikt: factavolo
 gå i bank = skeva
 gå ned: descendi
 hangar: hangaro
 hangarfartyg: ŝipo aviadila
 hangarplatta: placo manovra
 hangarplattform = hangarplatta
 hastighet ekvivalent: rapido ekvivalenta aera
 hastighetsmätare: rapidindikilo
 haveri: kraŝo
 helikopter: helikoptero
 hjälproder: kromklapo
 hjälpskärm: paraŝuto helpa
 horisontgyro: horizontalindikilo
 huvudspant vid vinginfästning: sparframo
 hydrodynamik: hidrodinamiko
 hydromekanik: hidromekaniko
 hydroplan: hidroplano
 hydrostatik: hidrostatikoj
 hål (i fallskärm): truo verta, truo elflua
 höjdaxel: levakso, akso normala
 höjd bästa: alto plej bona
 höjdmätare: altindikilo
 höjdmätare barometrisk: altometro

höjdroder: emperono
 höjdvinkel: altitudo

inflygningsljus: lumoj enfluga, lumoj enira
 igenkänningsljus: lumoj indentiga
 injustering (av aerodyn): rigado
 inklädnad: (form)garnaĵo
 instabilitet: nestabileco
 instrumentflygning: flugo instrumenta
 interferens: inferfero

jord(förbindelse): terkonektaĵo

kabin: kajuto
 karakteristisk (av ljussignal e. d.): karaktero
 kilvad: daŭbo
 klaff enkel: postklapo simpla
 klaffvinkel: angulo klapa
 klyvklaff: postklapo folia
 kodjuz: lumoj koda
 kompass: kompasoj
 konstantvarvspropeller: helico konstantrapida
 konstflygning: aerobatikoj
 konstruktion geodetisk: konstruo geodezia
 kraft
 kraft i x-riktning: forto laŭlonga
 kraft i y-riktning: forto transa
 kraft i z-riktning: forto normala
 krökning: kurbeco
 kurs: vojoj bira
 kursljus: lumoj vojmontra
 kursstabilitet: stabileco jora
 kursvinkel: angulo bira, biro
 kvalitetstal: finezo (kvociento de levo kaj rezisto)
 kylningsmotstånd: flugrezisto malvarmiga
 köl: kilo
 kölluft: postfluo kila
 kölsvin: kilsono
 kölvinkel: kilangulo
 körning på marken: aŭtokuro

landa: surigi

1 (på land): alterigi, surteriĝi
 2 (på vatten): alakvigi, surakvigi
 landflygplan: teraviadilo
 landningsbana: kurejo
 landningsfackla: torĉo alteriga
 landningshastighet: rapido suriga
 landningsljus: lumoj alteriga
 landningsområde: areo alteriga
 landningsstrålkastare: aerolumilo alteriga
 landningsställ: subekipajo, ekipajo suriga
 landnings-T med ljus: T-montrilo prilumata
 last betalande: ŝarĝo komerca, ŝarĝo speza
 last nyttig: ŝarĝo utila
 lastfaktor: ŝarĝofaktoro
 ljus fast: lumoj konstanta
 ljusknippe: lumfasko
 ljusstråle: lumfasko
 longerong: longerono
 loping: lopo
 göra en loping: lopi
 luftbroms: aerebremso
 luftcell: baloneto
 luftfart: aviado
 luftfartyg: aviadilo
 luftpastighetsmätare: kalkulilo aerorapida
 luftlogg: aerologo
 luftskepp: aerŝipo
